

BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

Nia virina
festo

Kultura agado
de la bulgara
popolo

De Kovacevci
gis 1923

Nia neforge-
sebla Vela ...

Fratoj
Miladinov

Ni recenzas

Organiza vivo

E-veteranoj
jubileas

Lingvaj
problemoj

Sporto



Nia virina festo



PER BELO KAJ FLOROJ

La Oka de Marto — la fest' de virinoj —
Nun sin manifestas per belo kaj floroj
Sur Tero, kovrita ĝis nun per ruinoj
De ĉiuj militoj — abundaj je ploroj.

... Sed scias mi: iam alvenos la tempo,
Por ĉiam forgesos homar' pri milito.
Kaj estos eterne sur Tero printempo,
Virina rideto, la amo benita.

E. R. Mity

KONFESO

Ĉiam mi tnegis al vi diri,
al vi diri kiel vin mi amas.
Mian amon devas mi konservi —
onidire belkrabin' mi famas.

Ne kuraĝis mi karese flustri,
flustri treme la plej karajn vortojn.
De mi ĉiam vi plenmane prenis,
kion tamen donis vi responde?

Portis vi vespere al mi varmon,
varmon de okuloj viaj helaj...
Nun ne sentas ilin mi proksimaj,
ne plu estas ili nun fidelaj.

Vlan nomon mi deziras kril,
k azaŭ sonĝe kril ĝin sen fln'.
Sed mi petas: voĉe ne reĉhu,
lu povas subaŭskulti nin.

JOANNA KRAEVA

LA VIRINOJ PRI SIA FESTO

Ing. MARIA TAŠEVA, membro de Bulgara MEM-
Komitato:

Deksesjara knabino mi eklernis la Internacian Lingvon Esperanto kaj aliĝis al la E-movado.

Miaopinie, mia socia agado estas nedisigebla de la batalo por paco. Delonge mi okupiĝas pri virina agado en la Komitato de la Batalantoj kontraŭ la Faŝismo. Mi ankaŭ aktivas kiel kunlaborantino al la Komisiono pri Virina Agado ĉe UEA.

Mi estas konvinkita, ke estonte oni festos la Internacian Tagon de la Virino — la 8-an de Marto, en la tuta mondo kaj ĉiuj virinoj amike kunpremos siajn manojn.

PENKA PAPAZOVA, agronomo Jambol:

La virino estas simila al la tero.

Mi kliniĝas antaŭ la ordinara vilaĝana virino — laborulino kaj patrino, kreinta per siaj manoj tiom da beleco, seminta en la sulkoj tiom da kredo kaj amo.

Jen kelkaj el miaj „virinaj“ versoj:

En mian sonĝon vi venis
kaj sidigis ĉe mi...
Vi donis al mi
la bukedon

de asperuloj.

En viaj varmaj manplatoj
ripozis kunigitaj
niaj animoj.

JULIA GELEVA, Instruistino, Iŝtiman:

Por mi tiu ĝoja festo komenciĝas en la infanĝardeno. Estas kortuŝa la ambicio, per kiu la infanetoj deklamas kaj kantas antaŭ siaj patrinoj; la enmanigo de donacoj, preparitaj de iliaj mallertaj manetoj. La samon faras ili por mi — ilia instruistino. Mi revenas hejmen ĝoja kaj tie min atendas kun amo la infanoj kaj la edzo. Kaj mi estas feliĉa!

BINKA ŜIŠKOVA, flegistino, Ruse:

La 8-an de marto mi ĉiam estas kun la ĝejnuloj el nia E-societo. Sed mi ankoraŭ ne konsideras la feston mia, ĉar mi ne estas edziniginta kaj mi ne havas infanojn. Ordinare mi vizitas miajn parencojn kaj eks-instruistinojn — la virinojn, kiuj min edukis.

Mi estas feliĉa, ke dank'al mia profesio mi havas lokon en la vivo kaj zorgas pri la sano de la homoj.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

J A R O 51

M A R T O

3 • 1982

LA KULTURA AGADO DE LA BULGARA POPOLO

Prof. d-ro KRESTJU GORANOV

La venkinta socialisma revolucio en Bulgario forigis la socialan abismon inter popolo kaj kulturo, kaj rezulte de la jam tri jardekojn realigata fruktodona socialisma kultura revolucio, la kulturaj valoraj kaj institucioj estiĝis tutpopola posedaĵo.

En 1939 ĉiu kvara bulgaro estis analfabeta. Nun analfabeteco apartenas al la historio, realigita estas ĝenerala okklasa klerigado, kaj la Naŭa Kongreso de BKP prenis decidon pri enkonduko de deviga mezgrada klerigado por ĉiuj gejunuloj.

En 1945 en la lando pri krea artlaboro okupiĝis ĉirkaŭ 2 300 personoj, hodiaŭ ilia nombro okobliĝis. Al ili tamen oni devas aldoni ankaŭ la multnombro, pli ol duonmilionan armeon de la partoprenantoj en la amatoraj arttrupoj el ĉiuj aĝoj kaj socitavoloj. La amatoran artagadon partoprenas 23—26-oble pli da personoj ol ĉiuj profesiaj agantoj en la sfero de arto. Ĝi estas nesekiganta fonto de novaj talentoj.

Multaj estas la formoj de morala stimulado. Pli ol 400 kulturagantoj estas laŭreatoj de Dimitrov-premio, pli ol 30 estas distingitaj per la titolo „Heroo de socialisma laboro“.

En 1950 estis eldonitaj 1780 libroj de bulgaraj aŭtoroj, en 1979 ilia nombro jam superas 3 800. Dum en 1945 estas eldonitaj 0,95 libroj popersone, en 1979 ili estas jam 7,8. Rapide evoluas la publikaj bibliotekoj, plimultiĝas ankaŭ la privataj bibliotekoj.

Dum la forpasintaj 37 jaroj la nombro de la profesiaj komponistoj kvarobliĝis, prosperas la interpreta arto. Niaj kantistoj kaj instrumentistoj merite gajnis vastan internacian rekonon.

Nia nacia kinoarto fakte estis kreita de socialismaj kondiĉoj. Dum en 1945 estis

produktitaj 10 filmoj de ĉiuj ĝenroj (belartaj, dokumentaj, scienc-popularaj, pentritaj k. a.), en 1970 ili estas 305. Grandaj estas la internaciaj kontaktoj kaj influo de nia kinematografia arto. Pli ol 97% de la loĝantaro havas la eblecon ĝui la kinoarton, en 4270 el ĝenerale 5320 loĝlokoj estas kinosalonoj.

Dum la dekjaro 1960—1970 pligrandigis la nombro de la dramteatroj de 24 al 34 (hodiaŭ ili estas 37) kun pli ol 13 000 teatrospektakloj po jare. La nombro de la ŝtataj pupteatroj proksimiĝas al 20. Ĉirkaŭ 6 milionoj da spektantoj jare vizitas la teatrajn salonojn.

Preskaŭ 5 000 legosocietoj kaj ankoraŭ tiom da kulturaj kaj junularaj domoj popularigas en tuta Bulgario la mondan kaj la patrolandan progreseman kulturon.

La junularo estas aktiva partoprenanto en la kultura proceso. La esploroj montras, ke pli ol 12% de la gejunuloj ĝis 28-jara aĝo faras kreajn provojn en diversaj artoj. Du trionoj de la tempo, kiun la bulgaraj civitanoj apartigas jare por kontaktoj kun la arta kulturo, estas konsumata de la junularo. Estas aktive plenumata tutpopola programo por estetika edukado kiel faro kaj movado de la tuta popolo. Ne nur laŭ sia soci-ekonomia bazo, sed ankaŭ laŭ sia enhavo kaj formoj de disvastigo, la bulgara socialisma kulturo estas **tutpopola** en la plena kaj ĝusta senco de tiu vorto.

Tiun ĉi vigan kulturan agadon partoprenas ankaŭ la bulgaraj esperantistoj. Jam estas sufiĉe popularaj la naciaj revuoj de la E-kanto kaj parolo, la recitalo de Botev-poezio kaj la konkursoj de originala kaj traduka E-poezio kaj prozo.

Tio estas grava kontribuo de la bulgaraj esperantistoj al la kultura vivo en nia lando.

DE KOVAČEVCI ĜIS 1923

18-a de junio 1946 — la 64-a naskiĝtago de Georgi Dimitrov, la unua, kiun oni festis sur bulgara tero post la venko de la revolucio. Tenjo Stojanov — unu el la veteranoj de la bulgara ĵurnalistiko rememoras, ke en tiu ĉi tago Dimitrov bonvenigas siajn gastojn „energia, svelta, flatita kaj afabla, milda kaj firma en sia konduto de vera revoluciulo — bela viro, kun alta hela frunto de saĝulo sub abunda griziĝinta hararo, kun okuloj viglaj, penetremaj kaj plenaj de homa amikemo, kun vizaĝo lumigita de facila senĝena rideto. Du fortaj manoj karese manpremas nin kaj detruas la barojn de la oficialeco kaj supereco. En tiu ĉi momento de ĝojo kaj konfuzo mi rememoris la vortojn de la ŝatata de Dimitrov germana verkisto Goethe, ke la granda homo estas nur homo. . .“

Ni vivas en la jaro 1982. La jaro unua de la 14-a jarcento de la sankta slav-bulgara alianco, kiu naskis la bulgaran ŝtaton. Jaro unua ankaŭ de la dua jarcento depost la naskiĝo de la gvidanto de la bulgara

Estas malfacile kredi, ke li ne plu vivas. En la infanaĝo ni rigardis la portreton de onklo Dimitrov sur la muro. Ni kantis kantojn pri li, deklamis versaĵojn. En la lernejo ni jam legis la libron de Kamen Kalčev „Filo de la laborista klaso“. Ĉiu jaro por ni estas Dimitrova. Ĉar ni konstante nin turnas por konsilo al la neforgesebla Dimitrov — per lia senmorta faro.

EN LA FAMILIA NESTO

Kiam oni rakontas lian biografion, oni kutime komencas per tio, ke li naskiĝis en vilaĝo Kovačevci, distrikto de Pernik. Sed Dimitrov mem sciigas, ke lia patrino naskis lin dum la tempo de rikoltado, sur la kamparo, sub la libera blua ĉielo: „La vero estas, ke mi naskiĝis sur la nuda tero mem, sub la suno, kaj la amikinoj de mia malriĉa patrino deŝiris siajn ĉemizojn, por vindi min. En tio ĉi mi vidas realan faron kaj simbolon de la solidareco kaj la humaneco de la homoj, kiuj laboras kaj helpas sin reciproke. Mia patrino estis analfabeta, senlaca laborulino, kun malmultaj konoj, sed kun granda kuraĝa koro, vigla penso kaj sana popola moralo. Ŝi, panjo Paraskeva, kaj mia patro Dimitar unuaj instruis kaj edukis min. Ilia plej grava vivprincipo estis laboro kaj kredo en la bono“.

En la familia nesto sin preparas por flugo laŭ la vojo de la revolucio ankaŭ la fratoj de Georgi. Fratoj ne nur laŭ sango, sed ankaŭ laŭ spirito. Konstantin — sekretario de la sofia organizaĵo de la sindikato de preslaboristoj, pereas en la Balkana Milito. Nikola estas laboristo, membro de la Socialdemokratia partio en cara Rusio. Pro lia revolucia agado li estas kondamnita al dumviva ekzilo en malproksima Siberio. . . Tie li mortas en la antaŭtago de la Oktobra Revolucio. La funkciulo de la eksterlega Centra komitato de la Bulgara Komunista Partio Todor Dimitrov post kruelaj torturoj estas mortigita de la faŝistoj en la Sofia Direkcio de la polico en 1925. En la soveta lando la pli juna frato de Georgi Dimitrov — Elena, elkreskas kiel aktiva agantino de la komunista partio. Kaj Magdalena, la milda fratino kaj kunbatalantino de Dimitrov, naskas kaj edukas la bravan partizanon Ljubčo Baramov.

Ljuba Ivoŝeviĉ estas ne nur zorgoplena edzino de Georgi Dimitrov, sed ankaŭ lia fidela kamaradino en la malfacila vivo kaj



L. Ivoŝeviĉ kaj G. Dimitrov

popolo Georgi Dimitrov — la homo, kiu oferis sian tutan konscian vivon por la prospero de nuntempa Bulgario.

batalo en daŭro de 25 jaroj. Dank' al siaj denaskaj taktoj kaj delikateco Ljuba ĉirkaŭas Dimitrov per konstanta atento kaj hejmea atmosfero, kreas al li bonegajn kondiĉojn por laboro. Dotita per la talento de poeto, per la erudicio de ĵurnalisto, per la kvalitoj de bona organizanto, ŝi legas, skribas kaj tradukas kune kun li. Ljuba Ivoŝević estas aktiva membro de la Komunista partio, aganto de la bulgara kaj la serba revoluciaj movadoj, membro de la Tutunia Komunista Partio (bolŝevistoj).

METILERNANTO

En 1886 la familio de Dimitar Mihajlov transloĝiĝas en Sofio. Naskiĝas ankoraŭ du infanoj, sed la enspezoj de la familio estas nesufiĉaj. Paraskeva de frumateni laboras per la teksilo, Dimitar kudras peltĉapojn en sia malgranda laborejo, sed ankaŭ Georgi devas komenci labori. La sciama knabo estas nur dekdujara, kiam li transpaŝas la sojlon de la presejo. Li estas denove lernanto, sed lernanto-kompostisto. Georgi adiaŭas siajn instruistojn kaj kamaradetojn, sed kun la libroj li ne disiĝas. La knabo legas pri la bulgaraj naciaj herooj Botev kaj Levski. La romano de Ĉerniŝevskij „Kion fari“ provokas ĉe li seriozan pripensadon. La 18-jara junulo studas la broŝuron de Büchner pri la materialisma filozofio. Poste li okupiĝas pri la Erfurta programo de Kaŭcki, pri la „Komunista Manifesto“ kaj pri la „Kapitalo“ de Marx. En 1897 la preslaboristoj por la unua fojo renkontas la nomon de Dimitrov en sia gazeto „Preslaboristo“ — li estas aŭtoro de artikolo, dediĉita al la proleta batalo por higienaj laborkondiĉoj.

SINDIKATA AGANTO KAJ PARTIA FUNKCIULO

Estante 18-jara, Dimitrov jam estas sekretario de la Sindikato de preslaboristoj en Sofio. Li komencas senlacen laboron por organizado de la sindikata movado de preslaboristoj en la tuta lando.

1902 estas memorinda en lia vivo — oni akceptas lin en la vicojn de la Bulgara Laborista Socialdemokratia Partio. Al la demando kial li deziras esti membro de la partio, la juna preslaboristo respondas: „Mi deziras esti membro de la partio, ĉar mi estas profunde konvinkita, ke la laborista klaso povas liberigi de la ekspluatado ne laŭ la vojo de klasaj kompromisoj, sed laŭ revolucia vojo.“ Tio ĉi ne estas efika deklaro, sed vivpozicio, kiun Dimitrov komencas defendi jam en 1899, kiam en Sofio estas organizita la unua laborista Unuamaja demonstracio kaj kiam pli malfrue, en 1911, li persone gvidas la strikantajn ministojn el Pernik en ilia marŝo al Sofio.



Georgi Dimitrov en 1923

Georgi Dimitrov estigas la unua sekretario de la Sofia partia organizaĵo de la striktaj socialistoj. Kaj depost 1909 li jam estas membro de la Centra Komitato de la partio de striktaj socialistoj.

En 1910 laŭ alvoko de Dimitrov oni organizas materialan helpon por la strikantaj svedaj laboristoj, kaj du jarojn pli malfrue — por la anglaj ministoj-striktantoj.

En 1913 Dimitrov estas la unua ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en tuta Sudorienta Eŭropo politika aganto-laboristo, elektita en la Parlamento kiel reprezentanto de la laborista klaso.

Post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio li popularigas ĝiajn sloganojn, batalas en defendo de la Soveta respubliko. En 1921 li partoprenas la laboron de la 3-a kongreso de la Komunista Internacio, kie li renkontiĝas kun Lenin. En la sama jaro li estas elektita kiel membro de la Centra Soveto de la Sindikata Internacio.

BATALO POR UNUECA FRONTO

La militoj en la komenco de nia jarcento (la Balkana, la Interalliancana kaj la Unua Mondmilito) kaŭzas al la popolamasoj senlaborecon, malsaton kaj mizeron. La faŝismo en Bulgario komencas malkaŝan ofensivon per la Naŭajunia puĉo en 1923. Depost tiam la vojo por renverso de la starigita sanga faŝisma

diktaturo estas nur unu — perarmila ribelo. Tial la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio sin turnas al la popolamasoj per alvoko por unueca fronto en la antaŭstaranta batalo. En „Laborista Gazeto“ de la 22-a de aŭgusto 1923 Dimitrov skribas: „La laboristoj kaj la popola inteligentularo ne estas organizitaj kaj unuigitaj en sia unueca politika partio. Krom la pliparto, kiu estas en la vicoj de la Komunista partio kaj marŝas sub ĝia standardo, alia, same konsiderinda parto membras en la Agrarana unuiĝo, tria — en la Socialdemokratia partio, kvara — kvankam tre malgranda — konsistigas sendube la plimulton de la Radikala partio. . . La unueca fronto praktike tute ne signifas rezignon pri siaj partiaj principoj, nek senindividuigon, ĝi signifas nur akcepton de komuna konkreta kontraŭkapitalisma platformo por defendo de la laborulaj amasoj kaj kune batalon por realigo de tiu ĉu batalo.“

LA UNUA EN LA MONDO KONTRAŬFAŝISMA RIBELO

eksplodas en Bulgario la 23-an de septembro 1923. Sub la gvidado de la Komunista partio la bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj ribelas kontraŭ la faŝismo por starigo de laborista-kamparana registaro. Rajtigito de CK de BKP, Dimitrov, kune kun la elstaraj agantoj de la partio Vasil Kolarov kaj Gavril Genov, senpere gvidas la militoperaciojn en la distrikto de Miĥajlovgrad. En sia bio-

grafia skizo pri Georgi Dimitrov la filino de Dimitar Blagoev — Stela Blagoeva skribas: „Jam en la unuaj horoj post sia alveno en la centro de la ribelo Dimitrov kaj Kolarov aparte zorgas pri organizo de la nova regpovo en la persono de la milit-revoluciaj komitatoj en la ribelintaj loĝlokoj, pri ilia kreo en ĉiu vilaĝo, pri organizo de la batalo en la tuta regiono kaj pri mobilizo de la loĝantaro. Vico da iliaj ordonoj pri organizo de la postfronto estas realigitaj: konfiskado de la produktoj necesaj por nutrado de la revoluciaj taĉmentoj kaj de la malsatantaj homoj en la vilaĝoj, organizo de malsanulejoj por la vunditoj, observo de la revoluciaj ordo kaj sekureco per gardo de la bankoj kaj la grenenejoj. . .“

La Septembra kontraŭfaŝista ribelo estas dronigita en sango. Ĝi estis batalo, en kiu la popolo donis multajn viktimojn, batalo, en kiu ĝi maturiĝis, por povi venki 21 jarojn pli malfrue.

Post la kruela frakaso de la ribelo Georgi Dimitrov kaj Vasil Kolarov elmigras en Jugoslavion. El tie ili sendas sian historian „Malfermitan leteron“ al la laboristoj kaj la kamparanoj en Bulgario: „Levu la kapojn! La kruela revengo de la burĝaro, kiu ektimis, ke povas perdi sian regpovon, ne sukcesos mortigi la batalspiriton de laborula Bulgario! La malvenko instruos nin kiel venki! Malgraŭ ĉio, estos laborista-kamparana registaro en Bulgario!“

MARIA JANKOVA

NOVAJ LIBROJ PRI GEORGI DIMITROV

La eldonejo de Bulgara Komunista Partio (BKP) ĉi-jare akcentas sur titoloj, dediĉitaj al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov. La serio de libroj aperontaj dum la jubilea jaro estos malfermita per la unua volumo de „Verkoj“ de Georgi Dimitrov (25-voluma eldono). En la kolekto „Rememoroj pri Georgi Dimitrov“ post la enkondukaj vortoj de Todor Jivkov eminentaj agantoj de la internacia komunista movado, inter kiuj Otto Kuusinen, Palmiro Togliatti, Maurice Thorez, Mihail Suslov, Vittorio Codovilla, Luis Carlos Prestes k. a. prezentas Georgi Dimitrov kiel profunde konvinkitan marksiston-leniniston, kiel

homon de brila menso kaj klara penso, kiel flaman patrioton kaj internaciiston.

Kunlabore kun „Politizdat“ (Politika Eldonejo) — Moskvo, estos presita la kolekto „Georgi Dimitrov“ — eminenta teoriulo kaj revoluciulo. Famaj bulgaraj kaj sovetaj historiistoj pridiskutas la formadon de Georgi Dimitrov kiel gvidanto de Lenina tipo, kiel elstara teoriulo kaj aganto de la internacia komunista movado.

Aperos dua eldono de la belarta-dokumenta libro „Ljuba“ de Kamen Kalĉev. En la biblioteko „Internacia politiko“ aperos la libro de Donĉo Daskalov „Georgi Dimitrov kaj iuj problemoj de la nuntempa revolucia proceso“.

NIA NEFORGESEBLA VELA...

(OKAZE DE ĜIA 60-JARA DATREVENO)



La ribelula vilaĝo Kamenica, kun domoj dissemataj sur sunlumigata deklivo en la mirinde bela Rodopimontaro, konis la majestecon kaj la frakason de la Aprila ribelo kontraŭ la osmana jugo en 1876, bonvenigis la rusan liberigan armeon en 1878, estis skulta de la Septembra kontraŭfaŝisma ribelo en 1923, donis vivon kaj azilon al karaj popolaj gefiloj — batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

En tiu bulgara vilaĝo, en la familio de Pejo kaj Katerina Peev la 16-an de marto 1922 naskiĝis tria infano — knabineto, al kiu la gepatroj donis la nomon Vela. Tie, en la valo de rivero Ĉepinska, kreskis Vela, amikiĝis kun la montaro, absorbis ĝian ribeleman spiriton.

Jam sur la lerneja benko kaj en la universitataj aŭditorioj ŝi preparas sin spirite al la perarmila batalo en la partizana taĉmento „Anton Ivanov“ kaj al sia heroo morto...

Vela Peeva ne ĝisvivis la venkon super la faŝismo, ne povis vidi sian patrolandon liberigita el sub la jugo de la kapitalo, sed ŝiaj vivo kaj batalo estas imitinda ekzemplo por la estontaj generacioj, kaj la iama vilaĝo Kamenica, laŭ ĝiaj floroj kaj ĉepinoj akceptis ŝian nomon, enkorpiĝintan en la floranta urbo-belulo Velingrad. Ŝian nomon portas lernejoj, junularaj kluboj kaj stratoj en Bulgario kaj en alilando, kaj la domon-muzeon en Velingrad vizitas junploniroj, gejunuloj kaj laboristoj el la lando kaj amikoj de Bulgario el ĉiuj mondpartoj.

Sudvjetnama partizano-poeto Nguej Huan Dam dediĉis al ŝi verkitaĵojn en Esperanto versojn, belegajn kiel la floroj de l'Oriento — ĉar ankaŭ Vela scipovis Esperanton. Jen estas fragmento el ili:

„Sur la altaĵo en Kamenica
ni staras antaŭ via maŭzoleo,
apud la pinoj, Vela Peeva.
Ho, nia fratino, ni aŭskultas vian voĉon.

Via ombro estos ĉiam kun ni
en la batalo kontraŭ la arogaĵ agrosantoj...“

Laŭ peto de la redakcio la iama partizanino el taĉmento „Anton Ivanov“ kaj koramikino de Vela Peeva — Nanka Dinĉeva (Vitka), nun — generalo Nanka Serkeĝieva, estis afable dividi siajn impresojn pri Vela. Revenante al la terura 3-a de majo 1944, ŝi emociite, kvazaŭ al si mem, diris:

„... Nur junulino kiel Vela, kiu ĉerpis fortojn el la forto de la montaro, el la forto de la popolo, povis elteni tridek sep tagojn kaj noktojn sur la Blanka Roko en malegala batalo kontraŭ multnombra malamiko kaj resti vera kaj fidela filino de ribelema Kamenica!...“

— GENERALO SERKEĜIEVA, KIAM KAJ ĈE KIAJ CIRKONSTANCOJ OKAZIS VIA UNUA RENKONTIĜO KUN VELA PEEVA?

— Estis la komenco de septembro 1943. En la loko Hrabrinsko apud Plovdiv troviĝis la stabo de partizana taĉmento „Anton Ivanov“. Je vesperiĝo al nia tendaro proksimiĝis partizana kolono — al ni venis karaj gastoj el taĉmento „Stefan Bojkov“, kiuj devis aliĝi al la stabo. Ni ĵetis nin al la kolono kaj kun ĝojaj bonvenigaj vortoj kaj ĉirkaŭprenoj ni intermiksiĝis kun la nove venintoj. Inter ili estis ankaŭ du partizaninoj — Vela kaj Katja. Ĝis tiam mi konis Vela'n nur de la rakontoj de miaj kamaradoj. Mi tuj rekonis ŝin. Mi jam delonge deziris vidi ŝin. La saman deziron havis ankaŭ Vela. Tion mi eksciis pli malfrue de ŝi mem.

Vela serĉis per rigardo iun en la homamaso. Mi staris silente kaj konfuzite. Mia koro batis freneze. Antaŭ mi estis ŝi — Vela, pri kiu oni tiom multe rakontis...

Mi ne scias kiom longe mi starus tiel, se Vela ne estus rompinta la silenton. Ŝi ridetis kaj unua ekparolis:

— Saluton, Vitka! Ni jam konas unu la alian. Vitka, ankoraŭ ne vidinte vin, mi ekamis vin. Mi mem ne scias kial, sed mi deziris kiel eble pli baldaŭ intervidiĝi kun vi.

De tiu ĉi momento komenciĝis nia elkora amikeco.

— ĈU VI PRISKRIBUS VELA TIAN, KIA VI VIDIS KAJ EKSENTIS ĜIN?

— Je la unua rigardo Vela aspektis silenta, eĉ timema. Sed nur je la unua rigardo! Ŝi estis meze alta, fortika, sana, nelacigebla. Ŝi portis grizan pantalonon el kvadrata ŝtofo, verdan puloveron, sur la piedoj ŝi havis ŝuojn el kruda porka felo.

Ŝi havis mallongan hararon, tonditan „à la garçon“, sur la kapo havis belan trikitan bereton. Min plej multe ravis ŝiaj grandaj inteligentaj okuloj, kiuj eĉ malantaŭ la okulvitroj ne perdis sian ĉarmon. Konstanta rideto beligis ŝian vizagon. Kaj tamen Vela ne estis pli bela ol la ceteraj partizaninoj — do al kio ŝi ŝuldis sian ĉarmon kaj per kio ŝi gajnis la amon de ni ĉiuj?

Ŝi parolis interese, kaptis la atenton, trovis komunan temon por interparolo kun ĉiu.

Vela tre amis la naturon. Multfoje mi vidis ŝin sidi apogante sin sur la trunko de iu pinarbo aŭ sur la roko, sola, kun paperfolio kaj krajono en la mano. Kion ŝi faris — ĉu notis ion en sia taglibro, aŭ skribis leteron, aŭ pentris la belan pejzaĝon?

En disputoj ŝi estis arda, elokventa kaj tiel klara kaj logika, ke oni ne povis ne kredi al ŝi, ne obei ŝin. Kaj en la griza ĉiutageco, kaj en la bagatelaĵoj Vela trovis manieron forpeli la tedon kaj la ĉagrenon ĉe la aliaj. . .

— MI PETAS, RAKONTU IUN EPIZODON EL VIA KUNA PARTOPRENO EN BATALOPERACIO.

— La komandantaro de la taĉmento preparis atakon kontraŭ arbaroficejo „Per-senk“, ĉar ĉe ni venis multaj novaj partizanoj kaj oni sentis akran bezonon pri nutraĵo, vestoj, kovriloj kaj armiloj.

La sekvan matenon ni preparis nin matenmangi, kiam flanke de la postenoj aŭdiĝis kelkaj paŝoj. Malbonsigne ekkakis mitralo. Sur la branĉoj de la arboj komencis fali plumba pluvo. Ni ĉiuj saltis, ne sukcesinte preni eĉ peceton da pano en la buŝo. La komandanto donis ordonojn por la antaŭstaranta batalo. La partizanoj rapide okupis siajn lokojn. Inter la arboj vidiĝis la bluaj uniformoj de la policianoj.

— Kapitulu, vi estas ĉirkaŭitaj! — aŭdiĝis aroga voĉo.

Ni respondis per pafado. La faŝistoj haltis kaj kuŝiĝis.

Vela, kiu pafis kuŝante apud mi, eldiris tra la kunpremitaj dentoj: „Venu, kanajloj!“ Ŝi aspektis kiel kolerega leonino. Ŝiaj okuloj kvazaŭ jetus fulmojn malantaŭ la okulvitroj. Apoginte al la ŝultro la kolbon de la pafilo, ŝi pafis kontraŭ la malamikoj.

La atako de la policianoj estis repuŝita. La komandanto ordonis, ke ni retiriĝu. Parto de niaj kamaradoj restis kiel ŝirmgrupo. Ni, la ceteraj, haltis en sendanĝera loko malproksime de la tendaro. Venis ankaŭ la kamaradoj el la ŝirmgrupo. En tiu ĉi kunpuŝiĝo kun la malamiko neniu estis vundita aŭ mortigita. . .

— KIAJ ESTAS VIAJ LASTAJ REMEMOROJ PRI VELA PEEVA?

— Mi havis la feliĉon dum ankoraŭ certa tempo esti kune kun Vela, sed jam en tendaro „Teheran“, kie la taĉmento devis pasigi la vintron. Tie en iu malgaja novembro tago mi aŭdis ŝiajn lastajn adiaŭajn vortojn kaj ĉirkaŭprenis ŝin por la lasta fojo. . .

En la komenco de junio 1944 en la tendaro de la noveformita partizana brigado „Georgi Dimitrov“ apud vilaĝo Ĥrabiŝto venis la sciigo, ke en malegala batalo kontraŭ la ĝendarmaro, sur la Blanka Roko, apud montopinto Arapĉal heroe pereis nia amata Vela. . . Mia sufero estis senlima. Mi perdis mian karan amikino, kaj ŝia loko en niaj partizanaj vicoj restis malplena. En la memoro de ŝiaj kamaradoj eterne vivos ŝiaj heroeco kaj sinofero. . .

Intervjuis: DONĈO ĤITROV

LA RAPORTO DE CK DE BKP ANTAŬ LA XII PARTIA KONGRESO APERIS EN ESPERANTO

Laŭ mendo de Bulgara Esperantista Asocio Agentejo „Sofia Press“ eldonis en Esperanto broŝuron, kies enhavo konsistas el du partoj: Raporto de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio antaŭ la XII kongreso kaj la antaŭstarantaj taskoj de la partio kaj Parolado de la Ĝenerala Sekretario de CK de BKP Todor Jivkov ĉe la fermo de la kongreso, faritaj la 31-an de marto kaj 4-an de aprilo 1981.

Jam multfoje CE de BEA estas eldoninta diversajn verkojn de la elstara ŝtatestro kaj arda pacdefendanto Todor Jivkov, kies teori-praktikaj principaj traktatoj de unuj el la plej akraj kaj komplikaj problemoj

de la nuntempa homaro estas rekonitaj kiel plua kontribuado al la marksisma-leninisma teorio. Ili estas ankaŭ teori-praktika helpilo en la batalo de la popoloj el Latin-Ameriko, Azio kaj Afriko por nacia kaj ekonomia liberigo el sub la jugo de koloniismo kaj kapitalismo, por nacia progreso.

La noveldonita broŝuro estas altnivele tradukita en Esperanto de kolektivo de spertaj esperantologoj: Kunĉo Valev, Ljubomir Miĥajlov, Kiril Drajev, Marin Bacev, Katja Konstantinova. La tradukitan tekston redaktis Georgi Dolapĉiev. La broŝuro havas 110 paĝojn. Ĝi estas mendebla ĉe la Centra Oficejo de BEA — bul. Ĥristo Botev 97, 1303 — Sofio.

FRATOJ MILADINOV

(120 JAROJN DEPOST ILIA PEREO)



K. Miladinov
(1830—1862)



D. Miladinov
(1810—1862)

Fratoj Dimitar kaj Konstantin Miladinov pereis tragike en la Istanbula malliberejo en januaro 1862 — nur ses monatojn post la apero en Zagrebo de ilia folkloro verko „Bulgaraj popolaj kantoj“ — unu el la eternaj libroj de Bulgario.

Ili naskiĝis en la tradiciplena malnova bulgara ĉefurbo Ohrid, en modesta, sed krea familia medio. Ilia patro estis fama majstro-ceramikisto kaj la patrino — bonega kantistino de popolkantoj. Ilia vivovojo komenciĝis de la malfacila agado de popolaj instruistoj, pasis tra akraj kunpuŝigoj kun la fanariota premo lige kun la enkonduko de la bulgara lingvo en lernejojn kaj preĝejojn, tra emociaj renkontigoj kun la popola poezia genio kaj ĝiaj kreantoj — popolaj kantistoj.

La grekaj lernejoj, famaj per siaj tradicioj, malfermas al ili la vojon al scienca retaksado de la historia vero pri la sorto de l'bulgara popolo — ĝiaj pasinteco, estanteco kaj estonteco emociigas ilin. Iliaj renkontigoj kun la profesoro el la Kazana universitato Viktor Grigoroviĉ (1845) pliiĝas ilian intereson al la folkloro. Senduba estas la fakto, ke la gastado de la rusa profesoro — specialisto pri slavaj lingvoj — en la domo de fratoj Miladinov en Struga, instigas ilin al kolektado de popolkantoj, kaj lia vigla intereso al la bulgara folkloro kaj al la loka dialekto daŭre kaptas la atenton de la pli aĝa frato dum la lastaj jaroj de ilia streĉoplena vivo — kaj kreovojo.

En 1852 Konstantin Miladinov forlasas la Atenan universitaton kaj komencas lerni rusan lingvon por daŭrigi siajn studojn en la Moskva universitato. En Moskvo li kunportas la jam kolektitajn folklorajojn: nur la kantoj nombriĝis 1200 (laŭ informo de Raĉinskij). En Moskvo K. Miladinov realigas ankaŭ la unuajn tradukojn kaj preparas

la kolekton por presado. Krome, li verkas versaĵojn, publikigas apartajn kantojn kaj proverbojn. En Moskvo li tamen ne sukcesas organizi eldonon de la tuta kolekto tial forveturas al Bulgario, sed, kiel li mem skribas al fratoj Robev, „oni retenis lin“ en Zagrebo, por eldoni la kolektitan „literaturan trezoron“ de nia popolo. Akceptita kaj helpata tre varme de episkopo Juraj Strosmajer, en daŭro de proksimume unu jaro li streĉe laboras por preparo de la libro por presado. La kroata, serba kaj ĉeĥa kultura publiko observas tiun ĉi lian agadon, informas pri ĝi sur la paĝoj de la gazetaro. En la bonega antaŭparolo K. Miladinov prezentas la ĝeneralan koncepton pri la folkloro, pri la krea genio de la popolo — kaj „Bulgaraj popolaj kantoj“ jam estas fakto, kiu altiras la atenton de la larĝa slava kultura publiko. La nomaro de helpantoj, publikigita en la fino de la libro, estas nereŭtebla pruvo, ke ĝi ekinteresis ne malmultan nombron da personoj en aliaj eŭropaj ŝtatoj: ĝi havas abonantojn ankaŭ en Parizo, Vieno k. a. Kaj dum en la ĉeĥa kaj rusa gazetaro aperis la unuaj entuziasmaj recenzoj, la du fratoj pereis en la malliberejo, persekutataj de la osmana registaro kaj de la malamo de la fanariota klerikaro. Ilia sorto altiras la atenton de la internacia diplomataro. Tio tamen ne preventis ilian tragikan finon. La aŭtoritataj klopodoj de Strosmajer kaj de Aksakov, la raportoj de la diplomaciaj reprezentantoj de Rusio, Francio, Britlando kaj Aŭstrio en Istanbulo ankoraŭfoje elmontras la signifon de fratoj Miladinov, ilian aŭtoritaton kaj lokon en la bulgara spirita kulturo kaj la riskoplenan, sed sole ĝustan vojon, kiun ili elektis, por esti utilaj al sia popolo.

M. MILADINOVA

Mia. Trifon Hristovski

VIVO



Sofia Pres

La E-eldono de la aŭtobiografia libro „Mia vivo“ de la konata forpasinta bulgara esperantisto Trifon Hristovski (aperinta jam kvarfoje en bulgara lingvo), estas grava, signifoplena evento por la bulgara esperantistaro.

Ne malpli grava kaj interesa estas tiu ĉi verko por la alilandaj esperantistoj, por la tutmonda E-movado.

Krome, ĝi estas valora kontribuo al la tutmonda esperanta literaturo. Miloj da esperantistoj el ĉiuj partoj de la terglobo tiamaniere povos konatiĝi kun la neordinara vivo kaj sorto de unu bulgara esperantistoheroo, konata ĝis nun precipe en Bulgario.

Kiu estas Trifon Hristovski?

Naskita en vilaĝo Radotina apud urbo Botevgrad en 1905, estante sesmonata bebo, li malsaniĝas je poliomyelito, sekve de kio liaj kruroj kaj la dekstra mano estas paralizitaj.

Nature, li ne povas viziti lernejon, sed li persiste, senĉese memkleriĝas, spite al sia malbona sanstato, dank' al la fera volo, dank' al la soifo pri sencoplena vivo.

Tiamaniere Trifon Hristovski akiris ampleksajn konojn pri geografio kaj ekonomiko, pri historio kaj medicino (la lasta pro la deziro ekscii pluajn faktojn kaj detalojn pri la suferoj, kiujn li spertis.

Trifon Hristovski: „Mia vivo“. Sofia — „Sofia Press“, 1981. Tradukisto: Nikola Aleksiev. Redaktoro: Asen Grigorov.

Vivante en konstanta mizero, suspektata kaj persekutata pro sia kontraŭfaŝisma agado, Hristovski dank'al sia senlima scivolemo kaj al la akirita tutflanka riĉa erudicio, sukcesis kolekti abundan materialon kaj verki kelkajn librojn.

Tamen unu el la plej gravaj kaj decidigaj momentoj en lia vivo estas tiu, kiam Hristovski aŭtodidakte ellenis Esperanton. La Internacia Lingvo malkovris antaŭ li vastajn horizontojn en tutmonda skalo. Starigante multnombrajn kontaktojn kun esperantistoj el ĉiuj partoj de la terglobo, publikigante multajn interesajn kaj kompetente skribitajn artikolojn en diversaj esperantaj revuoj kaj gazetoj, Trifon Hristovski sukcesis ne nur gajni amikojn-samideanojn en pluraj landoj, sed samtiel kolekti materialojn por skribi alian, nepublikigitan pro la faŝisma cenzuro verkon — „La milito en la Ekstrema Oriento“. Li eĉ estigas peranto de tiaj gazetoj kiel „Heroldo de Cinio“ kaj „Voĉoj el Oriento“, kiuj respegulis la lukton de la ĉina popolo kontraŭ la japana imperiismo.

Kiel skribas Hristovski mem, en 1929 li komencas aparte aktivan E-agadon. Publikigante sian adreson, li ricevis 70 proponojn pri korespondado. Rezulte de tio, li ekkorespondas kun esperantistoj el Germanio, USSR, Svedio, Francio, Nederlando, Aŭstrio, Usono, Britio, Japanio, Cinio k. a. Pluajn artikolojn li publikigas en la gazeto „Internaciisto“, organo de GPE kaj same en „Mejdunaroden Rabselkor“ („Internacia Laborista-Kampana Korespondanto“).

La libro mem „Mia vivo“ — verkita en plej malfavoraj kondiĉoj, neprilaborita literaturo, tamen estas treege interesa kaj oni legas ĝin „je unu spiro“. Sendube, ĉiu leganto povas mem sperti tion.

Kiel arde deziris Hristovski ĝisvivi la tagon de la libero! Sed bedaŭrinde — nur tri monatojn antaŭ la 9-a de septembro 1944 lia vivo estingiĝis.

Ni bone konscias, ke li forpasis nur fizike. Spirite li estas vivanta en nia memoro kaj li neniam mortos! Kaj tio validas ne nur por la bulgaraj geesperantistoj, sed por la tutmonda esperantistaro, ĉar li — kiel kontraŭfaŝisto, esperantisto, humanisto kaj internaciisto, estas unika evento en nia E-movado.

La tradukisto kaj la redaktoro sukcesplene plenumis sian taskon kaj ebligis al la bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj ekkoni unu neordinaran vivon kaj ĝui bonegan E-tradukon.

prof. VASIL ČOČOV

FORPASI IVAN SARAFOV

Ne estas plu inter ni Ivan Sarafov, la meritoplena veterano de la bulgara Esperanto-movado, la nobla homo, la amiko de la junularo. Lia lasta tago venis je la 18-a de februaro jaro kuranta.

Ivan Sarafov naskiĝis la 26-an de januaro 1900 en urbo Kazanlik. Pedagogian gimnazion li finis en sia naskiĝurbo, post kio studis en la Instituto por instruistoj. Lokon de instruisto li ricevis en Pleven en 1921. En tiu ĉi urbo li tuj troviĝis inter aro de junuloj, kiuj energie laboris por disvastigo de la Internacia Lingvo. Ne mire, ke la flamanima poeziema kaj verkema junulo (li havis jam la pekon eldoni verskolekton), senhezite infektiĝis kaj komencis aŭtodidakte lerni Esperanton. Lia agado tiom reliefigis, ke baldaŭ li estis elektita kiel prezidanto de la loka E-societo.

La societo esperantista en Pleven sub lia gvidado baldaŭ famiĝis kiel bastiono de la esperantismo — multnombraj kursoj por civitanoj kaj lernejoj, oftaj publikaj aranĝoj. Sed ankaŭ tio ne kontentigis lin. Dum la printempa lerneja ferio en 1924 li kun du amikoj-fervoruloj (unu estas la nuna atestimata profesoro Vasil Peevski) pilgrimis por propagandi Esperanton tra la urboj Loveĉ, Trojan, Sopot, Karlovo, Kalofer kaj Kazanlik.

En 1924 Ivan Sarafov komencis la eldonon de dusemajna propaganda gazeto en bulgara lingvo „Verda Stelo“. Ĝi estis bone redaktata, enhavoriĉa, kun klare esprimita progresema linio ĝuste en la jaroj de kruela faŝista teroro. Kaj ĝi trovis la rekonon de la vasta leganta publiko. Alta pinto de tiu progresema linio estas la aldonon al la gazeto, „Botev-Folio“, entute en Esperanto. Klarigante la ideojn de la granda bulgara revoluciulo kaj poeto Hristo Botev, ĝi vokis al persisto kontraŭ la faŝistaj sklavigantoj. Paralele la obstina aganto komencis la eldonon de biblioteko „Verda Stelo“, de kiu aperis (ankaŭ en bulgara lingvo) 5—6 tre valoraj libroj. Sed la sekvan jaron, en aprilo 1925, denove vastskale eksplodis la furioza faŝista ekstremado de ĉio progresema. La gazeto estis ĉesigita, la redaktoro eksigita de sia instruista ofico en la distrikta urbo.

Ivan Sarafov trovis instruistan lokon en vilaĝo Gabarevo, poste en vilaĝo Taja, regiono de lia naskiĝurbo. Ankaŭ ĉi tie li ne ĉesis labori por Esperanto. Baldaŭ li estis elektita kiel prezidanto de E-societo „Roza Valo“ en Kazanlik kaj multe kontribuis por ĝia fortikiĝo. De ĉi-tie li daŭrigis la komencitan en Pleven laboron por organizi la esperantistojn-instruistojn en la lando por pli fruktoriĉa agado en la lernejoj. Dum la XI-a nacia E-kongreso en Sofio (1925) fondiĝis la Ligo de

Bulgaraj Instruistoj-Esperantistoj, kies motoro estis li. Li membris en la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj-Esperantistoj (TAGE), disvastigis ĝian organon „Novaj Tempoj“ (poste ŝanĝita je „Internacia Pedagogia Revuo“), regule kunlaboris al tiu revuo kaj al la porinstruista bulteno per artikoloj pri la vivo kaj la bataloj de la bulgara instruistaro. En 1927 Ivan Sarafov reprezentis nian landon en la Internacia Konferenco por Paco per la Lernejoj, okazinta en Praha.

En Sofio li translokiĝis en 1936, kie denove okupis instruistan oficon. Kaj denove li plu aktive partoprenis la movadon. Kunlaboris en la asocia organo „Bulgara Esperantisto“, helpis al la ĉefurba E-societo per gvidado de kursoj, per prelegoj, eĉ per partopreno en la estraro. En 1940, malgraŭ la malfavoraj kondiĉoj, li sukcesis okazigi naciskalan Esperanto-ekzamenon, oficiale rekonitan de la Ministerio de Klerigado. La 27-a nacia E-kongreso (1940) elektis lin en la konsisto de CK de BEA. Estraro de BEA li estis dum 1956—1976, kaj dum 1964—1976 — sekretario de la Asocio. En 1946—1947 kaj en 1964—1972 li redaktas la asocian organon „Bulgara Esperantisto“. Li iniciatis kaj redaktis la revuon „Bulgara Filmo“ (1958—1960). Kiel prezidanto de Bulgara Esperantista Kooperativo li funkciis en 1946—1947. Dum deko da jaroj li estis komitatano de UEA. Kiel sekretario de LKK de 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (1963) li grave kontribuis ĝian sukceson.

Ivan Sarafov verkis memstare aŭ kune kun aliaj aŭtoroj 4 lernolibrojn, kies suma eldonkvanto superas 100 mil ekzempleroj. Li estas ankaŭ kunaŭtoro de la grandaj „Esperanto-bulgara“ kaj „Bulgara-esperanta“ vortaroj (1963—1964). En 1946 li aperigis valoran „Legolibron“.

Li estas aŭtoro de la libro „La instruistoj kaj Esperanto“ (1925), en bulgara lingvo. Propagandan libron en bulgara lingvo li verkis kune kun St. Masarov sub titolo „La mondo havas Internacian Lingvon“ (1961). Libron pri la historio de bulgara E-movado li eldonis en 1971. Krome li tradukis el la bulgara belartan literaturon en Esperanto.

Sarafov verkis ne nur pri Esperanto. Kune kun alia aŭtoro li eldonis gravan verkon pri la agrikultura eduko en Bulgario. Per artikoloj li kunlaboris en kelkaj bulgarlingvaj periodaĵoj.

Forpasis la kara amiko, la amata homo, sed lia utila faro ne forpasos. La nuna kaj la venontaj esperantistaj generacioj en nia lando plenmane ĉerpos de ĝi.

KR. KARUCIN

ESPERANTO — EN LA VIVO!

En Bulgario Esperanto gajnas ĉiam pli multajn adeptojn. Novaj esperantistoj eniras la vicojn de BEA. Tio postulas perfektigon de la formoj de organiza vivo. Kiamaniere oni povus plialtigi la rolon de E-societo kaj de la societa kunveno?

Tio estis la ĉefaj temoj de la seminario, okazinta en Plovdiv la 6-an kaj la 7-an de februaro ĉi-jare. Pli ol 140 partoprenantoj — prezidantoj kaj reprezentantoj de E-societoj el la tuta lando, dividis siajn spertojn en diversaj sferoj de la organiza vivo, pridiskutis siajn taskojn por 1982.

Laboro kun la junularo, komuna agado de E-societoj kun la soci-politikaj organizaĵoj — tio estis nur parto de la problemoj, provokintaj viglajn diskutadojn inter la partoprenantoj. Tiun temon traktis en siaj raportoj Binka Siškova el Ruse kaj Hristo Manolov el Polski Trambeŝ. La sperto de iuj societoj montras, ke efika estas la kunlaboro kun la komunumaj Komitatoj por Defendo de la Paco, kun la Komitatoj de la profesiaj unuigoj, kun la Domoj de kulturo kaj kun la Komsomolo.

„La publikigo de materialoj pri diversaj E-araĝoj fare de amaskomunikiloj — diris Bojčo Mladenov el Vraca — estas problemoj ne nur de prestiĝo, sed ebleco pri varbado de novaj esperantistoj.“

La seminario, organizita por unua fojo en

nia lando, komencigis per la raporto de Dimitar Papazov — sekretario de CE de BEA. Li detale pridiskutis la diversajn momentojn de organizado de societaj kunvenoj. Z. Oŝanska dividis tiurilate la sperton de Sofia E-societo „M. Gorki“.

La problemoj pri la intereso de gejunuloj al nia movado estas ege grava por la disvastigo de Esperanto.

Elena Stojkova el Burgas parolis pri la junigo de la E-estraj. Oni atentigis la partoprenantojn pri la plialtigo de la lingvokono de gejunuloj.

Inĝ. Dimitar Jdrakov el Velingrad substrekiis, ke la vigla kultur-agado estas grava faktoro por junigo de la E-movado. Necesa estas originala E-kulturo per kreado de esperantistaj amatoraj artkolektivoj.

En sia raportoj Inĝ. Petar Todorov — vicprezidanto de CE de BEA — parolis pri la E-korespondado. „Per ĝi devas komenciĝi E-agado ĉiu membro de nia asocio“ — diris la raportanto.

La diskutoj en la seminario priskribis la bildon de la organiza stato de la E-societoj. Oni substrekiis, ke la granda intereso al nia movado flanke de diversaj institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj en la lando postulas pli seriozan organizon laboron por disvastigo de Esperanto en ĉiuj sferoj de la vivo.

ROZALIA KARASTOJANOVA

NI JAM EKLABORIS

„Bulgara Esperantisto“ jam anoncis al la en-kaj eksterlanda esperantistaro pri la granda ĝoja evento — pri la enkonduko de Esperanto en la bulgarajn mezlernejojn. Ĝi sciigis ankaŭ pri la unua paŝo — la tutlanda konferenco de la esperantistaj instruistoj, kiu donis rekomendojn pri organizo de la instruado en la mezlernejoj.

Kaj nun ni jam alpaŝas al realigo de tiu grava tasko. En Sofia-distrikto jam funkcias korespondanteesta kurso por E-instruistoj, kiuj en la lernejo 1982–1983 instruos Esperanton. La kurso komenciĝis en decembro 1981. Fine de ĉiu monato la gekursanoj venos en Sofion por duontaga instrulaboro. Krome, dum la vintraj kaj printempaj ferioj ili venos por unusemajna laboro. Dum la someraj ferioj ili partoprenos 20-tagan kurson. Post la fino de tiu ĉi kurso ili faros sian ekzamenon kaj ricevos la diplomojn.

Dum la jam pasintaj vintraj ferioj okazis unusemajna instrulaboro. Instruis M. Bacev kaj M. Elenov laŭ la lernolibro de Markov, Valev kaj Sarafov, laŭ kiu venontjare Esperanto estos instruata en la lernejoj. Krome, en la planitaj lecionoj estis konversacioj kaj kantoj. Ĉar ni ne disponis pri multe da tempo, ni okupigis ankaŭ pri la ekzamen-demandaro. La antaŭlastan tagon 6 gekursanoj (ni memoru, ke

pli ol la duono estas filologoj kaj la ceteraj ankaŭ estas profesiaj instruistoj en mezlernejoj) faris provlecionojn, kiuj pasis tre sukcese. La lastan tagon ni dediĉis al ekzameno sur la lernita materialo. Tiu eksperimento evidentiĝis sukcesa kaj fruktodona.

Kiu kaj kio kontribuis por tiu sukcesa komenco? Unualoke la Sofia Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigado kaj la Sofia Distrikta Estraro de BEA — la organizantoj de la kurso. Konstantan ligan inter ambaŭ instancoj efektivigis la senlaca reprezentanto de DE de BEA — k-do Zahari Ivanov.

Kaj krome — la helpemo de la lernejaj direktoroj, partiaj sekretarioj, sindikataj kaj komsomolaj agantoj ktp.

Oni devas emfazi precipe la grandan kaj valoran kontribuon de la prezidanto de la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigado Ilia Kusev, de la vicprezidanto Kočev kaj de la inspektoro de franca lingvo Margarita Popova, kiu jam estas ankaŭ inspektoro de Esperanto.

Kaj fine, sed ne lastloke, ni devas menciigi ankaŭ la grandan intereson de la gekursanoj, ilian fervoron, diligentecon kaj laboremon, kiuj estas garantio, ke „paso post paŝo“, post longa laboro, ni atingos nian celon en glorio!

M. ELENOV

36-a JARKUNVENO DE BULGARA E-KOOPERATIVO

Jam 36 jarojn ekzistas la Bulgara Esperantista Kooperativo. Dum tiu longa periodo ĝi plimultigis kelkoble sian membraron kaj organizis ampleksan reton de magazenoj, librovendejoj kaj surstrataj standoj en la ĉefurbo kaj en pluraj lokoj en la tuta lando. En ili estas vendataj diversspecaj varoj, esperantaj lernolibroj kaj E-verkoj de bulgaraj kaj fremdlandaj aŭtoroj. Tiamaniere BEK plenumas ne nur siajn ekonomiajn taskojn — ĝiaj magazenoj estas ankaŭ specifa formo por popularigo kaj propagando de Esperanto.

Hodiaŭ BEK estas unu el la plej aktivaj ĉeneroj de la Bulgara Centra Kooperativa Unuiĝo kaj vicigas inter ties plej prosperantaj organizaĵoj.

La 20-an de februaro k. j. BEK okazigis sian 76-an jarkunvenon, kiun partoprenis kooperativanoj el la ĉefurbo kaj el aliaj lokoj de la lando, reprezentantoj de CE de BEA kaj de BCKU.

Pri la unujara aktivado de BEK raportis ĝia prezidantino ing. Maria Paskova.

Gojiga estas la fakto, ke BEK plenumis sian jaran planon pri la produktado en ĉiuj siaj laborejoj kaj magazenoj 45 tagojn antaŭ la fino de la pasinta 1981 jaro. La plano pri enspezoj kaj gajnoj estas plenumita. La gajno estas egala al 358 mil levoj. Tio estas bonega rezulto de la plibonigita organiza strukturo kaj la regula varprovizado de la kooperativaj magazenoj kaj la varieco de la varoj en la komerca reto de BEK.

„Malgraŭ ĉiuj kuraĝigaj akiraĵoj de BEK, — substrekis la prezidantino ing. Paskova — niaj streboj estos daŭre direktitaj al plivastigo de la reto el magazenoj kaj standoj, al pliriĉigo de la varobjektoj per produktado de 82 novaj modeloj kaj al plibonigo de la arta arango de la vitrinoj de niaj magazenoj

kaj librovendejoj. En tiu ĉi direkto nin atendas ankoraŭ pli obstina laboro!”

La Administra Estraro de BEK montris senduban atenton al sia poresperanta agado.

La librovendejoj kaj standoj de BEK estis provizitaj per E-literaturaĵoj kaj E-suveniroj. Dum la okazinta en Ruse III Internacia Medicina Konferenco la estraro de BEK aktive partoprenis kaj ĝustatempe organizis standon kun E-literaturaĵoj, suveniroj kaj aliaj produktaĵoj de la kooperativo.

Specialan atenton BEK turnis al la plivastigo kaj la plibonigo de la E-skolo-tendaro en vilaĝo Drujevo, kie estos kreitaj favoraj kondiĉoj por rezultodona studado, laboro kaj ripozo de la gekursanoj en la someraj kursoj de Esperanto.

La raporto de ing. Paskova kaj de la Kontrola Konsilantaro de BEK, la proponitaj ŝanĝoj en la statuto samkiel la aliaj dokumentoj pri rezultodona funkciado kaj produktado de la kooperativo provokis viglajn diskutojn kaj celkonformajn eldirojn fare de la ĉeestantaj kooperativanoj. La reprezentantoj de CKU kaj BEA direktis varmajn kaj sincerajn salutvortojn, instigojn kaj bondezirojn al la Estraro kaj al la laborbrigadoj de BEK, esprimante la konvinkon, ke en la kuranta jaro ili atingos novajn pli bonajn rezultojn ne nur en la ekonomia kaj komerca agado, sed ankaŭ en la popularigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Kiam oni eniras iun librovendejon aŭ magazinon, sur kies pordo estas ŝildo „Esperanto”, oni nepre devus eksenti ilian specifan artaranĝon, trovi riĉan artan varsortimenton kaj eksenti la ĝentilecon de la vendistoj, kun kiuj oni eĉ povus paroli en Esperanto!

D. S. Ĥ.

SOFIA ESPERANTO-HORO VIGLE AKTIVAS

Okaze de la „Verda Semajno” honore al la 122-a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof, la Sofia Esperanto-horo prezentis koncerton gaste al E-societo „Solldareco” en la proksima al la ĉefurbo kuraĉloka urbo Bankja. La salono estis plenplena de membroj de la societo kaj de feriantaj en Bankja laboruloj.

En la Kulturdomo de fervojistoj en Sofio estis organizita granda literatura-muzika vespero. La Sofia Esperanto-horo partoprenis per multaj altnivela plenumitaj kantoj.

La Sofia Esperanto-horo dum sia ĉirkaŭ 6-jara ekzistado gajnis konsiderindajn sukcesojn. Inter pluraj spektakloj ĝi unuan fojon prezentis sin ankaŭ sur internacia podio dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en 1978 en Varna, kie ĝi rikoltis entuziasmajn aplaŭdojn. Tio des pli kuraĝigis la horistojn kaj la horistron Dimitar Terziev abnegacie daŭrigi kaj plibonigi sian laboron.

Dank' al la entuziasmo de la horistoj kaj la diligenta partopreno en la provokzercoj, post nelonga tempo la horo prezentis antaŭ sofia publiko kelkajn koncertojn. Rimarkinda inter ili estis la koncerto en la Domo de Tekniko en Sofio. La programon de la horo partoprenis ankaŭ konataj profesiaj kantistoj-esperantistoj: Veselin Damjanov, Maria Angelova, Dimitar Denčev, Karamfilka Adamova, Prodan Prodanov k. a.

Riĉenhavan muzikprogramon prezentis la horo antaŭ la kongresanoj en la 40-a jubilea kongreso de Bulgara Esperantista Asocio en Plovdiv 1980.

La horo jam nombras pli ol 70 personoj. De ĝiaj vicoj estis elektitaj la horistoj de la noveorganizita profesie altnivela ĉambra ĥorensemblo. Nun la horo preparas novan riĉan programon kaj krom en Sofio intencas prezenti sin ankaŭ en la provinco.

STEFKA AKMANOVA



LARĜE MALFERMITA FENESTRO AL LA MONDO

La sekcio „Kolektanto“ ĉe Bulgara Esperantista Asocio aranĝis belegan bildekspozicion en la Kulturdomo de Transportaj Laboristoj apud la Centra Stacidomo en Sofio. La ekspozicio proponis al la vizitantoj 38 ilustritajn bildtabulojn de elstaraj bulgaraj esperantistoj-kolektantoj kiel Nikola Aleksiev, Rajna Konstantinova, Marin Marinov, Zora Ošanska, Veska Nakova, Nadejda Cipakova, Elena Kuzeva, Peška Dobrova, Metodi Pančev, Stojan Vasilev el vilaĝo Begleŝ, distrikto de Pleven. La plejparto — 25 tabuloj, apartenis al la senlaca sekretario de sekcio „Kolektanto“, Georgi Litov, organizanto kaj iniciatinto de la ekspozicio.

En ĉeesto de multaj sofiaj esperantistoj la ekspozicio estis inaŭgurita la 20-an de januaro ĉi-jare de la prezidanto de Bulgara E-Asocio Ĥristo Gorov. Li emfazis la grandan propagandan efikon de la ekspozicio kaj la utilan laboron de sekcio „Kolektanto“ por disvastigo de la Internacia Lingvo.

Ĉiuj ekspozicioj — bildkartoj, ilustritaj poŝtkartoj, E-prospektoj, fotoj, faldfolioj kaj aliaj materialoj estas ricevataj per la aktiva multjara internacia korespondado de la menciitaj esperantistoj.

La 38 tabuloj estis aranĝitaj laŭteme pri diversaj landoj — Aŭstrio, Hispanio, Italio; aparte pri kosmonaŭtoj kaj la Kosmo en 2001 jaro, aparte pri la sovetunia urbo Leningrado, pri la artgalerioj „Tretjakovskaja“ kaj „Ermitaĝo“, pri la Moskva Kremlo ktp. St. Vasilev disponigis bildkartojn pri Roterdamo, Berlino, Londono, Marsejlo, Filadelfio, Budapeŝto k. a. Tre interese montris sian interkorespondadon kun japanaj esperantistoj kaj pri siaj du vizitoj en fora Japanio M. Marinov. De liaj ekspozicioj oni ekscias ankaŭ pri eldonita en Japanio libro pri nia lando dank' al ricevita el Bulgario kaj de Marinov korespondmaterialoj.

La granda intereso al la ekspozicio de „Kolektanto“, ne estas hazarda, ĉar ĝi efektive estas larĝe malfermita fenestro al la tuta mondo.

IVAN ESPEROV

LA VOĈO DE ESPERANTISTOJ

En la aŭloforma salono de la profesia teknika lernejo „Georgi Dimitrov“, plenplena de ĝelernantoj kaj ĝeinstruistoj, eksonis la pacema voĉo de la esperantistoj. Per konvinkaj paroloj la ĵurnalisto Ivan Keremidčiev-Esperov emociis parolis pri la preparado de la usonaj militemaj regantoj kaj NATO-aliancoj bruligi trian mondmiliton kaj per atomaj kaj neŭtronaj bomboj, per bakteriologiaj kaj venenaj rimedoj nenigi la homan kulturon kaj nian planedon. Tiujn intencojn kontraŭstaras la honestaj homoj en la tuta mondo kaj speciale la popoloj de la landoj de NATO kaj Usono mem.

Kontraŭ tiuj militplanoj elstaras la socialismaj landoj, kiuj neas la militon kaj proponas pacajn kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn kaj konkuradon inter ĉiuj landoj. Por defendo de la tutmonda paco aktive laboras ankaŭ la esperantistoj en ĉiuj landoj. Ja iliaj ideoj kaj streboj estas per Esperanto doni al la popoloj elikan rimedon por interkonatiĝo, amikiĝo kaj paca kunlaborado.

Por malhelpi al la milito la esperantistoj kaj speciale la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) nun en ĉiuj landoj kolektas subskribojn de bonvolo kaj kontraŭmilita strebo.

I. K. E.

MEDIOPROTEKTADO KAJ ESPERANTO

Malpurigo de la naturo kaj la homa medio konstante progresas kaj jam prezentas danĝeron por la homaro.

Lige kun tio la Ekologia Sekcio ĉe BEA turnas sin al ĉiuj geesperantistoj, kiuj deziras agi kontraŭ la grava danĝero de malpurigo kaj detruo de la naturo, aliĝi al la organizata internacia kaj interfaka „Ronda Tablo“, kiu fakte jam funkcias — en junio 1981 en urbo Sviŝtov, Bulgario, okazis Unua Nacia Ekologia Konferenco kun internacia partopreno. En la kadro de la konferenco funkciis E-sekcio kaj Esperanto estis oficiale rekonita kiel tria laborlingvo krom la bulgara kaj la rusa. Dua konferenco okazos same en Sviŝtov en 1984. Al la laboro de la konferenco grave kontribuos la kolektiva membreco de fakaj organizaĵoj kaj individuaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la celoj de la forumo „Ĉe la ronda tablo“.

Bonvenaj estos ĉiujspacaj konvenaj materialoj, kiujn ni eldonos en broŝuro „Homo kaj medio“, dediĉita al la „Ronda Tablo“.

Prof. ĤRISTO MARINOV,
prezidanto de la Ekologia
Sekcio ĉe BEA



Obstine kaj diligente lernas la Internacian Lingvon gabrovaj lernantinoj el lernejo „T. Karpinskaja“ sub la gvidado de Sonja Tiĥova.

Foto: ĤRISTO METEV

NOVAJ AMIKOJ DE ESPERANTO

Grupo da adeptoj de la Internacia Lingvo, laborantaj en la nova Kombinumo por Prilaborado de Aluminio „Stamen Stamenov“ — Ŝumen, starigis komencon de amasa lernado de Esperanto.

Ĉiun merkredon grupo da ĝejunuloj el diversaj fakaj kolektiĝas en unu el la klasĉambroj de la Sindikata Kulturdomo. Ili diligente kaj sindone ekspozas la lecionojn. Al ili instruas la sperta kursgvidanto Ilija Andreev. La rezultoj estas ĝojigaj. Ĉiuj, kiuj regule vizitas la kurson, jam legas, skribas kaj tradukas bone.

Post la fino de la lernoprogramo ĉiu kursano komencos korespondadon kun geesperantistoj el aliaj landoj kaj oni starigos kontakton kun la E-grupoj en la uzinoj por aluminio en la hungara urbo Szekesfehervar kaj urbo Deĉin — CSSR. Tiamaniere oni kontribuos al la amikeco inter niaj popoloj kaj por kreo de kontaktoj je profesia nivelo.

CVJATKO TODOROV

E-JARKUNVENOJ

SMOLJAN En sia raporto pri la agado de E-societo „Kulturo“ dum la pasinta jaro la prezidanto Rumen Bukov informis, ke la estraro faris multon por plenumo de la programo konekse kun la taskoj, starigitaj de la XII Kongreso de BKP kaj la postuloj de la CE de BEA.

Estis raportite, ke la estraro de la societo atingis certajn rezultojn en la instruado de Esperanto al la anaro kaj en la kultur-amasa agado pere de la Internacia Lingvo same kiel pri plivigligo de la korespondado kun alilandaj esperantistoj. Bedaŭrinda estas la fakto, ke pro manko de spertaj instruistoj oni ne sukcesis organizi kursojn pri fakultativa instruado de Esperanto en la mezlernejoj en la urbo. Funkciis nur unu kurso por civitanoj.

Pro nesufiĉa propaganda laboro la membroj de la societo ne plenumis la kontrolajn ciferojn pri abono de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ — tute malgranda estas la nombro de la abonintoj.

Pli vigan aktivadon la membroj de la societo montris en la kampo de belarta amateco: partopreno en la XIV Nacia Revuo de la Esperantista Kanto kaj Parolo en Pazargik, en kiu la E-grupo, gvidata de Ruĝa Gjurgakova, gajnis duan premion por recitado kaj Balina Kasamska por individua plenumo de rodopaj kantoj en Esperanto gajnis la grandan individuan premion — ekskurson eksterlande.

La partopreno de la amatora Kino-klubo „Evridika“ en diversaj naciaj festivaloj ankaŭ estis distingita per multaj premioj.

La societo havas 90 membrojn, kiujn atendas pli aktiva kaj rezultodona laboro dum la nova organiza kaj lernojar.

MARIA DIČEVA

VELIKO TIRNOVO. La E-societo „Lumo“ okazigis sian jaran kunvenon. En la raporto de Maria Pejškova estis emfazite, ke la plej grava evento en 1981 por la esperantistoj en Veliko Tirnovo estis la 90-jara jubileo de la organizita E-movado en la malnova bulgara ĉefurbo. Jam en 1888 la volapukista grupo en la urbo esperantigis kaj en 1891 la apoteikisto Nikola Zlatev fondis E-societon „Fulmo“, kies nomon oni ŝanĝis en „Lumo“ (1896). Konata kiel lulilo de socialismo en Bulgario, Veliko Tirnovo estas ankaŭ lulilo de Esperanto.

Dum la jubilea jaro la urba esperantistaro plivigligis sian societan vivon. En la nova klubo estas bonaj kondiĉoj por E-kursoj. Cvetanka Deneva inventaris la E-literaturon — i. a. donacitaĵojn de malnovaj esperantistoj. Penka Kateva kolektis ĉirkaŭ 500 subskribojn por la Kvaka kontraŭmilita kampanjo. Trifoje la teatra E-grupo de Il gimnazio prezentis sian E-teatraĵeton. Estonte la gelernantaj grupoj starigos kontaktojn kun la E-klubo en Poltava, USSR. Kiel gravan taskon en sia estonta laboro la estraro de la societo starigas la varbadon de instruistoj por la someraj E-kursoj. En la diskutado de la raporto oni traktis diversajn problemojn: pri 75-jarigo de BEA, kiu okazos aŭtune en Veliko Tirnovo; pri la programoj de la E-kunveno; aranĝoj pri la E-propagando. Estis substrekitaj la neceso de obstina laboro por altiri al nia E-movado gelernantojn kaj laboristojn.

Maria Pejškova estis reelektita kiel prezidantino de la societo.

O. CANKOVA

PLOVDIV. En E-societo „Lumo“ membras 30 blindaj esperantistoj. En la raporto de la estraro antaŭ la jarkunveno estis objektive prezentita la agado de la societo dum la pasinta jaro. Kompare kun la antaŭaj jaroj ĝi estis ne tiel rezultodona. Sed ni kredas, ke la aktiveco de la membroj plivigligos lige kun la celebrado de la 75-jarigo de BEA kaj kun la 25-jara jubileo de nia societo.

Ci-jare en Esperanto aperos la versaĵoj de la granda bulgara poeto Vapcarov en unuvoluma brajla eldono. Estos eldonita ankaŭ la unua plena brajla adresaro de bulgaraj blindaj esperantistoj. Oni diskutas pri eldonado de brajla E-gramatiko.

Nia E-societo ĉiujare organizas E-kursojn. Sed neregule oni organizas la kunvenojn de la parolrondo. Esperanton ni propagandas organizante kune kun la organizaĵoj de blinduloj en la urbo kaj la junuloj el entrepreno „Uspeli“ interesajn vesperojn kaj renkontiĝojn.

Ciuj blinduloj, kiuj posedas la brajlan sistemon, abonas al la aperantaj en ĝi eksterlandaj revuoj: „Esperanta Ligilo“, „Aŭroro“, „Pola Stelo“, „La Kontakto“ kaj „La Blinda Esperantisto“. Menciinda estas la fakto, ke ĉiunonate en la studio de la Unuiĝo de Blinduloj en Bulgario oni surbendigas la belan revuon „Bulgara Esperantisto“ kaj regule sendas ĝin al la regionaj fonotekoj. Tiamaniere ĉiu blinda esperantisto el la lando havas la eblecon aŭskulti ĝin ĝustatempe. Ni ĉiuj esprimas nian sinceran dankon al nia amikino Belka Beleva pro la realigo de tiuj ĉi bonegaj surbendigoj. La blindaj esperantistoj en Plovdiv vige korespondas kun siaj kunfratoj laŭ sorto el diversaj landoj de la mondo. Tio pliriĉigas ilian ĉiutagecon per daŭraj amikaj kontaktoj.

Nia societo partoprenos la Nacian revuon de la E-kanto kaj parolo en Plevan, la Recitalon de la Botev-poezio en Vraca kaj la Recitalon de la Vapcarov-poezio en Bansko.

DANĈO DANĈEV

MEDICINISTA E-RENKONTIĜO

Antaŭ nelonge en Loveĉ okazis IX Medicinista E-renkontiĝo. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 90 medicinistoj kaj aliaj esperantistoj el Sofio, Plevan, Gorna Orjakhovica, Veliko Tirnovo, Gabrovo, Trojan, Letnica, Levski, Svištov k. a. La aranĝo havis internacian karakteron: gastis samideanoj el Sovetunio kaj Rumanio. Sub la gvido de prof. Kiril Popov — prezidanto de la Medicinista sekcio de BEA, la partoprenintoj pridiskutis la 25-jaran E-agadon de medicinistoj-esperantistoj en Bulgario kaj ankaŭ ilian estontan laboron. La ĉeestantoj parolis pri la eblecoj por interŝanĝo de scioj kaj sperto inter la medicinistoj el la tuta mondo pere de Esperanto.

D-RINO T. OMER



E-VETERANOJ JUBILEAS

La poŝtista E-societo „Heroldo“ festis la sepdekjarigon de sia aktivulino **KATJA MANEVA** — longjara sekretario de la societo kaj de la Sekcio de poŝtistoj ĉe BEA.

Nia kara Katja — talenta pentristino — dediĉis sian arton ankaŭ al la E-movado kaj al la batalo por monda paco. De siaj veturadoj eksterlande, kie ŝi partoprenis universalajn kongresojn de Esperanto, Katja Maneva alportis multajn pentraĵojn, skizojn kaj ankaŭ lumbildojn, per kiuj ŝi konigis al la publiko, kaj speciale al la esperantista publiko interesajn vidindaĵojn, naturfenomenojn de nekonataj landoj kaj urboj, detalaĵojn pri la ĉiutaga vivo de ties loĝantaro.

Per sia poresperanta agado Katja Maneva altiris al nia movado multajn novajn esperantistojn, kiuj pliriĉigis niajn vicojn.

La festado de ŝia 70-jara jubileo estis korvarma manifestacio de la amo kaj estimo de ŝiaj amikoj kaj kolegoj kaj rekonno de ŝia kontribuo al nia E-movado.

La ĉeestantoj superŝutis la jubileulinon per donacoj kaj kisoj kun bondeziroj pri longjara aktiva vivo kaj pri plua agemo por la prospero de Esperanto.

M. ĈOBANOV

En la Zamenhofa tago E-societo „Lumo“ — Veliko Tirnovo, solene festis la jubileon de kvar veteranoj de la bulgara E-movado. Salutinte la jubileulojn, Maria Pejкова — prezidantino de „Lumo“, enmanigis al ĉiu el ili la libron „Apostolo de libereco“ de Mercia Mac Dermott.

La redakcio gratulas ia jubileulojn kaj prezentas ilin al la legantaro.

NIKOLA TAŠKOV. En 1922 kiel lernanto en la komerca gimnazio — Svištov, lin entuziasmigis la ideo pri la Internacia Lingvo. Memstare li lernis Esperanton laŭ la lernolibro de ADA. La korespondado kun diversaj geesperantistoj donis al li eblecon perfektigi la lingvoposedon. En sia naskiĝvilaĝo Kucina (distrikto de Veliko Tirnovo) li gvidis E-kursojn, samkiel en Gorna Orjakhovica, kie li estis fervoja oficisto.

Unufoje li partoprenis la E-kongreson en Ruse — 1924, kie praktike konvinkigis pri la taŭgeco de Esperanto. Dum la UK en Varsovio 1959, li partoprenis la E-kurson kaj diplomigis. La agema E-aktivulo N. Taškov estas ekzemplo por ĉiuj junaj esperantistoj: somere li deĵoras, helpas diverslandajn esperantis-

tojn en nia urbo. Dank' al li ni havas belaspektan klubojn.

BORIS TJUTJUNKOV. Eksinstruisto en la komerca lernejo — Veliko Tirnovo. Kiel lernanto de la Knaba gimnazio en Veliko Tirnovo en 1923 li lernis Esperanton en la kurso de Har. Bačvarov. La sekvantaj jaroj en la sama lernejo estis fondita la lerneja grupo „Flamo“, kies kunfondinto estis B. Tjutjunkov. En 1926 li partoprenis la I-an ĝeneralan E-kongreson en V. Tirnovo kaj la Junularan E-kongreson en Varna.

Ekde 1933 B. Tjutjunkov oficis en la Komerca gimnazio de Veliko Tirnovo, kie li gvidis E-kursojn. Multaj bulgaraj ĝeneralantoj konas lin, ĉar kiel ekskursgvidanto li bonege klarigadis la historion de la malnova bulgara ĉefurbo Veliko Tirnovo.

Lastatempe li gvidas sukcese E-kursojn en la Sindikata Domo. La sperta pedagogo disvolvas sociagadon en la Instruista sindikato.

NIKOLA NAJĐENOV. Elstara E-aganto en Veliko Tirnovo. Li esperantigis en 1929 kiel lernanto en la Komerca gimnazio en la urbo, kie li lernis Esperanton en la kurso de Haralambi Bačvarov. Memstare li daŭrigis la ekposedon de la lingvo. Kune kun sia samgimnaziano Petko Najdenov li organizis plurajn E-aranĝojn, gvidis E-kursojn, kio plivigligis la lernejan societon „Zamenhof“ (estinta nomo „Internario“).

N. Najdenov estis multfoje prezidanto de la urba societo „Lumo“. Li estas aktiva. Li partoprenis preskaŭ ĉiujn landajn E-kongresojn. Li estis membro de la Organiza Komitato de 36-a kongreso de Bulgara E-Asocio en Veliko Tirnovo en 1960. Li eldonis broŝureton pri la jubileo de la urba societo en 1976 sub titolo: „Veliko Tirnovo — la antikva ĉefurbo de Bulgario“, redaktita de V. Oljanov. La urba esperantistaro multon ŝuldas al N. Najdenov kiel sekretario de la Distrikta komitato.

ANGEL MITEV. Unuan fojon li aŭdis pri Esperanto en 1924 en Polski Trambes, kie li lernis la Internacian Lingvon en la kurso de Dimitar Ivanov el Ruse. Multe li korespondis kun eksterlando per Esperanto kaj ricevis E-gazetaron.

En 1936 A. Mitev transloĝigis en Veliko Tirnovo kaj estigis membro de E-Societo „Lumo“. Dum pluraj jaroj li estis ĝia kasisto. A. Mitev gvidis E-kursojn en 1928 en Svištov kaj Veliko Tirnovo. Li estas gastama esperantisto. Ofte li helpas niajn E-amikojn-turistojn, vizitantojn Veliko Tirnovo. Kune kun N. Taškov li multon faris por la arango de la urba E-klubejo.

OLGA CANKOVA

GRAVA SCIIGO

KARAJ LEGANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“!

La redakcio sciligas al ĉiuj, kiuj ne sukcesis aboni nian asocian organon, ke ni ankoraŭ disponas pri certa libera abonkvanto. Viajn mendojn bonvolu sendi al la adreso de la redakcio — Bulgario, 1303 Sofio, bul. „Ĥristo Botev“ 97.

La jam aperintaj n-roj 1 kaj 2/1982 de „Bulgara Esperantisto“ havas modernan kaj belan eksteraron kaj pli varlan kaj interesan enhavon.

Ne preterlasu la okazon aboni al „Bulgara Esperantisto“!

KIAL DO LA ANGLA LINGVO NE POVAS ESTIĜI LINGVO TUTMONDA?

Resumo el la eldiro de Rikardo Sulco, farita je la 7. XI. 1980 en la kadro de la V laborkolokvo pri «Interlingvistiko en la kulturo kaj la scienco» (kunveno pri cibernetiko de la lingvoj kaj cibernetika pedagogio) en la Centro de Esploro kaj Disvolvigo de Instru- kaj Studmetodoj en Paderborn, FRG.

(El «Franca Esperantisto» N-ro 331, 1981)

Verdire, mi ne estas spertulo por trakti tiun temon en mia eldiro, ĉar mi estas nek anglo, nek anglicisto. Mi studis la anglan lingvon dum 9 jaroj kaj mi tralegis la plej eminentajn ĉefverkojn de la angla literaturo. Dum mia studado mi partoprenis parolrondojn pri angla lingvo kaj mi plurfoje vizitis Anglion. Nun, estante 74-jara, mi konstatas, ke mi ankoraŭ ne regas (perfekte) la anglan lingvon.

Ofte oni aŭskultas la aserton, ke pere de la angla lingvo oni povas starigi kontaktojn kaj interkompreniĝi ĉie. Verdire, tiu angla lingvo, kiun oni uzas ĉe diversaj cirkonstancoj, por la orelo de iu anglo aŭ de iu amerikano estas parolado, abomena por aŭskultado kaj tute ne sufiĉa por interŝanĝo de nuancitaj ideoj. Eĉ la perfekta kono de sia patrolanda lingvo ne tro helpas iun anglofonon, se lia interparolanto ne scipovas sufiĉe bone la anglan lingvon por kompreni lin. Kiom da homoj estas kapablaj sin esprimi senere en angla lingvo eĉ post jaroj da studado de tiu ĉi lingvo? La angla lingvo estas ne nur iu el la plej malfacilaj lingvoj, sed kiel tutmonda lingvo ĝi estas malpli taŭga ol ekzemple la franca, hispana aŭ itala lingvoj. Sen la granda politika kaj ekonomika potenco de la du grandaj nacioj, la angla lingvo neniam estus disvastigita tiomgrade. En la angla lingvo ekzistas abismo inter la lingvo parolata kaj la lingvo skribata. Certa kvanto de skribitaj paroloj tute ne korespondas al ilia prononcado. Oni rajtas opinii, ke iun tagon la 260 milionoj da homoj, por kiuj la angla lingvo estas gepatra lingvo, ne povos interkompreniĝi alimaniere krom skribe.

En la angla lingvo ekzistas alia malfacilaĵo kaŭzanta multajn miskomprenojn. Ĝi devenas de la ekonomika principo, kiu karakterizas ĝin kaj kiu igas iun saman vorton esti substantivo, adjektivo aŭ eĉ verbo! La manko de akuzativo, kiu momente povas ŝajni

alloga kaj agrabla, fakte estas grava difekto. Tio ja provokas certan rigidon de la konstruado de la propozicioj (frazoj), kaj oni ne ĉiam evitas la miskomprenojn.

Pro siaj sennombraj idiomoj, pro sia ortografio, ne adaptita al la prononcado; pro siaj ekstreme reduktitaj gramatikaj rimedoj, la angla lingvo estas unu el la plej malfacilaj lingvoj, kiun alilandano povus perfekte el-lerni!

Sed unu el la plej gravaj cirkonstancoj, kiuj faras la anglan lingvon ne taŭga estiĝi tutmonda lingvo, estas ĝia prononcado, kiu ĉiam elmontras la alilandanon kaj ĉiam igas iun sin senti pli-malpli izolita. La angla lingvo baziĝas sur sistemo de 20 vokaloj. Ju pli la vokala sistemo estas abunda, des pli la malfacilaĵoj por prononcado fare de iu alilandano estas multnombraj. De tiuj cirkonstancoj devenas gravaj diferencoj en la prononcado en Usono, Kanado, Aŭstralio, en la proksima Irlando. Simila prononcsistemo tute ne konvenas al lingvo internacia.

Kaj kion diri pri la riĉeco de la vortaro kaj la vortfarado? Tuta homa vivo eĉ ne sufiĉas por ĝin asimili!

Evidente estas, ke la plifortiganta influo de la angla lingvo devigas nin okupiĝi pri ĝi. Sed ni ne devus permesi tion al ĝi pli ol ĝi jam estas akirinta! Ni eĉ ne rimarkas kiomgrade niaj pensoj estas influitaj de la angla-saksa mondo. Ni sentas ties literaturan kaj scian invadon des pli fatala, ĉar ni jam estas al ĝi kutimiĝintaj. . .

Kian lokon okupas, ekzemple, en la pensado de kelkaj germanoj la arabaj, sudamerikaj, rusaj, ĉinaj aŭ japanaj kulturoj kaj literaturoj?

Ĉu ni devas toleri la lingvajn avantaĝojn de angloj kaj usonanoj, kies politikajn kaj ekonomiajn influojn ne povas antaŭvidi?

Multaj germanoj en FRG konsideras tute nature la anglan lingvon kiel tutmondan, sen maltrankviliĝi pri la faktoj kaj pri la konsekvencoj.

Ni posedas modelan internacian lingvon — multe pli taŭgan ol la angla lingvo por internaciaj interrilatoj kaj kiu (mi estas tute certa) iun tagon nepre venkos. Sed tiu problemoj jam eliras la kadrojn de mia parolo — ĝi estas temo por aliaj diskutoj.

ONI JARCENTOJN PAROLIS...

KANTO PRI RUSIO

Teksto popola

Muziko: Nikolaj Obreškov

KANTO PRI RUSIO

Teksto popola

Muziko: Nikolaj Obrešk



Oni parolis, parolis,
oni jarcentojn parolis:
venos frata Rusio
el jug' nin liberigos.

En Svištov¹ paŝa² ĉe tablo
kafon plezure trinkadis.
Sklavin' blankbulgarino
pipon al li fumigis.

Paŝao ĉien rigardis —
jen supren kaj jen malsupren:
blankas io tra Danub' —
li miras, ne komprenas.

Ĉu estas blankaj kolomboj?
Ne estis blankaj kolomboj,
estis frata Rusio
kun la Donaj kozakoj.

Dum la paŝao milregis,
rusoj Danubon travadis:
Rusio Bulgarion
el jugo liberigis.¹

¹ Svištov — bulgara urbo sur la bordo de Danubo.
² paŝao — turka altrangulo.

EL LA ENHAVO DE N-RO 1-A DE „PACO“/1982

1. La milito eviteblas — I. Pethes
2. La neŭtrona armilo — H. A.
3. Ekumena voĉo de paco
4. Zamenhof pri la internacilingva ideo —
C. Murgin
5. Kontraŭ komplikadon de Esperanto (pri
Plena analiza gramatiko) — V. Oljanov
6. Poezia antologieto, literaturajoj

EL LA ENHAVO DE N-RO 126/82 DE „PAAKTIVULO“

1. Deklaro pri kunlaboro inter SAT kaj
MEM
2. Al la Naŭa ĝenerala konferenco de MEM
en Antverpeno
3. El la vivo de MEM
4. Tra la esperanta gazetaro
5. Subskriba kampanjo por malmarmado
6. Nekrologo pri Nguyen Van Kinh



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Minka G. Kazakova (34-jara agronomo), str. „Maksim Gorkij“, bl. 8, v. h. A, ap. 18, 6400 Dimitrograd — kun ĉi pri lingvaj problemoj kaj scienca fantastiko.

Sider Dimov Jelev (23-jara fraŭlo), 6422 Dolno Belevo — kun ĉi pri ĉi.

Malina At. Sarastaneva (12-jara lernantino) str. Petrana Cirpanlieva 3, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Antoaneta Iv. Grozeva (12-jara lernantino), str. „Totju Popov“ 10, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Maria C. Georgieva (12-jara lernantino), 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Daniela Z. Stojanova (12-jara lernantino) str. „Aristo Popov“ 12, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Aristo Dečkov Jonkov (12-jara lernanto) str. „Aristo Patrev“ 2, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Kornelija And. Perčemlieva (12-jara lernantino), str. „Strangata“ 25, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Boris Iv. Grozev (12-jara lernanto), str. „Totju Popov“ 10, 6150 Sipka — kun ĉi pri ĉi.

Junaj esperantistoj deziras korespondi tutmonde pri ĉi, komuna adreso: P. K. 7, 4600 Velingrad — Vaska Bogdanova, 22-jara oficistino; Elena Janeva, 21-jara oficistino; ing. Boris Gaĝanov, 36-jara; Aksinija Topalova, 20-jara medicina flegistino; Svetla Sodeva; ing. Vasil Batački; Vencislav Eličin, 25-jara teknikisto; Maria Sarafova, 20-jara oficistino; Ljubka Kitova, 20-jara oficistino; Emil Aleksandrov, 37-jara agronomo; Stojanka Enčeva, 25-jara muzika pedagogo; Stojna Simeonova, 22-jara oficistino; Rosica Vladimirova, 22-jara oficistino; Snejka Ĥriščeva, 24-jara instruisto; Maria Bueva, 24-jara instruisto; Zdravka Angelova, 33-jara instruisto; Veska Ĥristova, 25-jara oficistino; Mitra Georgieva, 30-jara teknikisto; Ivan Ĝinčev, 30-jara teknikisto, amatora iluziisto; Jordanka Ĝinčeva, 21-jara oficistino; Snejka Červenкова, 25-jara medicina flegistino; Ĥristo Esapčev, 20-jara oficisto; Dosta Filipova, 16-jara lernantino; Elena Sopova, 19-jara studentino de medicino; Elena Jančeva, 38-jara instruistino.

Ĝelernantoj-esperantistoj 12—13-jaraj kun vigla belarta aktivado deziras korespondi tutmonde kun samaguloj en la socialismaj landoj por reciproka

ĉiadi. Komuna adreso: 4600 Velingrad, P. K. 7 — Troja Nikolova, Cvetanka Stojanova, Stefka Temelkova, Asja Paskova, Zorka Ĥorozova, Vanja Soleva, Emilia Ŭsleva, Medijana Sondrova, Ilijana Karanova, Elena Haleva, Aneta Sarkova, Nevenka Garbeva, Marijana Cinceva, Biserka Levičarova, Stojanka Raĝova, Meri Pačova, Malinka Tolupova, Adelina Vrančeva, Tanja Gogova, Sonja Mančeva, Maria Ĥristova, Jordanka Radičeva, Zlatinka Jordanova, Silvia Mečkarska, Tatjana Conkova, Silvia Torbeva, Svetla Čokleva, Boris Pavlov, Radoslav Budinov.

Sabka Petrova Ilieva (42-jara medicina flegistino), bul. „Borodinski boj“ 72-B, 1229 Sofia — kun ĉi pri ĉi, kolektas belaspektajn saketojn de nilono.

Bojan G. Miĥalkov — str. „Ljuben Karavelov“ 8, 2227 v. Bojurište, distr. Sofia.

GDR

Ĝefumomalsatantoj — pri hataĵoj kaj aliaj temoj. Eble renkontigo somere dum la tendvagado inter Sofia kaj la Rodopa kaj Pirinmontaro. Komuna adreso: Utz Friedrich 1071 Berlin, Rodenbergstr. 5.

HUNGARIO

Ĝelernantoj 8—14-jaraj — kun samaguloj pri filatelo, muziko, sporto k. a. Komuna adreso: Sámson László, Sümeg, Jffusag u. 24, H-8330.

E-gekuranoj — komuna adreso: Lehelvezér tér 33, Kulturcentro „Déryné“, H-5101, Fászberény: Marta Bágyi, 21-jara fraŭlino, komercistino; Kristina Bágyi, 15-jara lernantino; Zoltán Béres, 24-jara fabrik-laboristino; Georgo Hagyo, 61-jara pensiulo; Jozsefné Kárpáti, 37-jara hotel-estriro; Eva Muhari, 12-jara lernantino; Judita Tógyer, 19-jara fraŭlino, komercistino; Imre Emeriko Tóth, 65-jara pensiulo.

Rácz Erőzet (23-jara E-instruistino), Mezőcsát, Általános Iskola, 3450.

Fazekas Miklós (40-jara soleca viro, fervojisto) Balatonfüred, Népköztársaság u. 3 D/5, H-8230 — pri vojaĝo kaj fotografado.

Vadász Klára (23-jara) Békéscsaba, Tanácsköztársaság út 58, H-5602 — pri belartoj, politiko, kolektas naciajn pupojn, ilustritajn poŝtkartojn kaj modjurnalojn.

Gabor Denes, Erdos B. 50. III/9, H-2600 Vac — pri vojaĝoj kaj fiŝkaptado.

Fajos Kovács (37-jara agronomo), Szerencs, Előhegy ut 14, 3900 — kolektas poŝtmarkojn.

János Gál (33-jara laboristo) Sárovar Bartók B. 28, H-9600 — pri reciproka gastigado.

Kiss József, Magyarorszag, Jánberény, Lepke u. 1, 5100.

Redakta komitato

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI, prof. Vasil ČOČOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV, Lidia RAEVA.

Administranto: Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodo“ — I grado. Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofia, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofia

tel. 31-00-29

SPORTO

LA PLEJ GRANDA SUKCESO!



Antaŭ kelkaj tagoj en Usono finiĝis la plej granda en la mondo turniro de teniso por junulinoj — „Orange Ball“, konsiderata kiel neoficiala ĉampioneco de la planedo. Ĝin partoprenis entute 128 tenisistinoj. Ekskluzivan sukceson atingis la ĉampionino de Bulgario Manuela Maleeva, kiu konvinke gajnis la unuan lokon en la konkuroj por junulinoj ĝis 14-jara aĝo. Tio ĉi estas la plej brila venko en la ĝisnuna historio de la teniso en Bulgario, kiu ankoraŭfoje pruvis la enviindan talenton kaj la grandegan laboremon de nia juna sportistino. Sub la gvidado de sia patrino kaj trejnistino Julija Berberjan — multfoja respublika ĉampionino, ŝi ankaŭ nun supreniris la plej altan ŝtupon sur la ŝtuparo de la venkintoj.

Laŭ la vojo al la fina venko Manuela Maleeva sinsekve venkis siajn rivalinojn el Nederlando, Usono, Francio kaj Britlando.

Grandan sukceson en la konkuroj por junulinoj ĝis 12-jara aĝo atingis ankaŭ la pli juna fratino de Manuela — Katerina Maleeva, kiu okupis la kvaran lokon en la finklasado. Interesa estas la fakto, ke antaŭ du jaroj, ĉe la sama turniro, Manuela Maleeva same okupis la kvaran lokon...

La ĝojiga sukceso de la du bulgaraj konkurantinoj Manuela kaj Katerina Maleeva esperigas pri novaj venkoj de la bulgara teniso.

Estas menciinda la fakto, ke de la turniro „Orange Ball“ komencis sian sportan karieron la plej famaj tenisistoj en la tuta mondo.

NOVA KAJERO DE „BULGARINO“

En decembro pasintjara aperis la laŭvica numero de revuo „Bulgarino“ — fremdlingva eldono de la Komitato de Bulgaraj Virinoj.

La kajero estas dediĉita al la 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato. Tial iuj el la temoj, proponataj en ĝi, koncernas jarcentojn tre malproksimajn de nia nuntempo.

Multaj artikoloj tamen estas dediĉitaj ankaŭ al nia nuntempo, al la loko de la bulgara virino en ĝi.

Foliumante la paĝojn de tiu ĉi numero la leganto povas akiri ideon, kvankam ĝeneralan, pri la spirita viro de la bulgaro, pri la historia vojo, kiun pasis la bulgara popolo, pri ĝia strebo konservi kaj plimultigi la hereditajn virtojn, vivi en amikeco kun proksimaj kaj foraj popoloj, doni sian kontribuon por konservo de la plej granda homa bono — la tutmonda paco.

La kajero estas belaspekta, abunde ilustrita. La E-eldono estas havebla ĉe Bulgara Esperantista Asocio.

